GISTO, JUL-2006.

Georgo O. Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo.

SENUTILA PETADO

Eble ankaù vi chiuj sentas sin submetitaj al gxenaj monpetoj de personoj sed ankaù de organizajxoj, ne nur el la chefurbo, kiel ekzemple far LBV. Nu, chiu mem rajtas decidi, chu donaci ion aù ne. Mi mem chiam bonanime diras: jes, kompreneble oni devas helpi vian faman organizajxon kaj mi malavare helpos,post kiam vi adoptis kiel kutimon instrui Esperanton al viaj infanoj (aù zorgatoj). Tia sinteno bremsas iliajn atakojn kontraù nia posxo.

GEA

Karaj GEA-geanoj, alvenas la tempo kiam ni devas mobilizi nin kun la celo eluzi la grandan eventon de oktobro en POA, la Librofoiron. Oni tre esperas ke la nuna estraro ne dormetos dum la momento oportuna, por havigi al Es°. brechon che unu el la librovendejoj.
Aldone: mi riskas supozi ke GEA ne forgesis plenumi sugeston kiun nia prezidanto Rossetti proponis en la oficiala organo: alskribi urbestrojn cele interisigi ilin pri la urbaj gxemeligxoj, laù tio kion chi kolumno menciis pasintece.

INFANIDO...!

Chu la titolo sxajnas al vi absurdajxo?
Kiu chiutage trarigardas jxurnalon certe legis kaj ankaù sxokigxis pro la informo, ke knabino naùjara, de la etno apurina',el Jxaturama 84 Km for de la chefurbo Manaùs', naskis infanon! Se sxia agxo estas vere gxusta, mi ekscias pri kazo ne antaùe legita. Se tia homa multobliga proceso disvastigxos, kiel insektoj aù ratoj, post pokaj jaroj ankaù nialande okazos sangoversxaj bataloj pro manko de trinkakvo. Malgraù chiuj mankoj de nutrajxoj tamen estas religiuloj kiuj ne volas scii pri bremsado de naskoj. Sed ili ne proponas sin por savi chiujn infanojn mortantajn pro malsato, ne nur en Afriko. Kaj jen, oni stumblas kontraù la petpregxoj. Milionoj, eble miliardoj da homoj pregxe petas "...la chiutagan panon donu al NI (ne al mi) hodiaù..." – Chu neniu el la pregxantoj meritis/as atenton de la Chiopova? – Mia religio pro tio daùras la sama: nur danki al Dio, por chio bona gxuata/ita.

CHU ADOPTI LA VORTON ŜLI?

Sen emo malaltigi la klopodojn de nia diligenta Luiz, serche al kurta vorto, samtempe valida por LI kaj por SXI, la propono rezistas en mia pensejo. Poste, legante la verkon LA LASTA VIRINO, laù traduko de la lerta esperantisto Arnoldo Águila Miguel, mi trovis alian proponon, laù mi, gramatike pli taùgan. Malgraù gxia stranga aspekto, la tradukinto pravas. Li rekomendas la vorton ULI kaj klarigas: UL signifas: persono karakterizata de. – Aldonante la finajxon "I" oni konstruas personan pronomon kiu nur signifas "persono", sen mencii sekson, tiu estas, LI aù SXI. Aldone li diras ke oni povas sxerce tiel difini certajn ulojn sekse ne difinitajn. Fonie (tra mikrofono) la vorto klare diferenças de la aliaj pronomoj

(li,sxi,mi,vi, ktp). – Se oni amase uzos la novan pronomon, chefe poetoj, la vortaristoj certe rinarkos gxian utilecon kaj iam enlistigos la novajxon.

HOMAJ RASOJ

Farigxis preskaù dangxere mencii la vorton raso. Iu povus misinterpreti ties mencion kiel malapreco kontraù nigruloj sed dum la olimpikaj ludoj de 2006 en Germanio, konfirmigxas tio jam bone rimarkita dum sportaj konkursoj. La “palvizagxulaj” kluboj devas importi afrikanidojn se ili volas konkeri championecojn. Vetkuristoj timas perdi avantagxojn por la afrikanoj. El tio venas en mian kapon ke, certagrade la nigra raso vivis disigita de blankuloj, ne nur pro la “Apartheit” en Afriko, same en Usono kaj Sudameriko, tial ilia sango restadas rase preskaù pura kaj, laù forto kaj rezistokapalo, ili estas mirinde elstaraj.

Chi tio ne mirigas. Kiam oni volas vendi valorajn vetkurajn chevalojn oni memkompreneble elektas purrasajn; se oni volas produkti ovojn, oni elektos kovenajn ovojn el purrasaj kokinoj, ktp. El tio dedukteblas, que la negroj endas teni pura sian rason, por farigxi nevenkeblaj atletoj kaj fieri pro ilia supereco. Jes ja, karaj blankaj mamuloj, tiam vi svenos pro senfina trejnigxo sed tre malofte venkos!

HOSPITALO SANKTA FAMILIO.

Invitite de la hospitala kapelano en mia urbo, pastro Ruperto, por aùdi iom pri Esperanto, mi havis sxancon viziti la tute renovigitan kuracejon de Kaiurbo. Gxi ricevis plejzorgan modernigon, de la pavimo gxis la tuta tegmento. Farigxis kvazaù juvelo! Nu, kaj pri lia intereso...?... sxajnis al mi ke la “semo” povos gxermi. Li, klerulo scias paroli en plurajn lingvojn kaj, laù mi, tuj parkerigis la simplajn tempojn de la verboj, kvankam li havas pli malpli mian agxon.

REAGOJ

Preskaù neniam unu el la Gisto-legantoj manifestas sin pri la enhavo de chi legajxo. Tial ke chiumonate INSS atestas ke mi estas malrichulo kaj tial devas sxpari, al chiuj gelegantoj mi petas adresi al mi skribajxon dirante ke ŝli, (aù, chu uli?), ne plu volas ricevi chi legajxon. Mi fordankas pravigojn kiuj diros: mankas al mi tempo. Se la koncerna skribajxo enhavos erarojn, mi konkludas ke ŝli preferas restadi kiel eterna postlama lernanto, sen kuragxo alparoli fremdulojn kiuj portas steleton sur la brusto. Fu!

Iom da bonhumoro.

RUZA REAGO

Edzino diskumas al sia edza laborejo – Li respondas. – Sxi demandas: Kiu parolas? – Li fanfarone diras: chi tie parolas la plej elstara amanto de la mondo. La edzino diras: Pardonon, mi erare diskumis.

SOLIDARECO

Edzino pasigis la nokton eksterdome. Frumatene sxi revenas kaj pravigas sin: belan nokton mi pasigis che familio de unu el la plej bonaj amikinoj. La edzo decidas telefone kontroli. La amikino konfirmas. La edzo celas egalpoenti. Vespere ankaù li eldomigxas kaj pasigas tutan nokton ekstere. Reveninta li pravigas sin: mi pasigis la nokton che unu el miaj dek longtempaj amikoj. Edzinjo decidas havigi al si konfirmon. Sxi telefonas al la dek amikoj. Sep el ili konfirmas; tri respondas ke jes, ke li ankoraù dormas tie...hi...hi!

Se al la anekdotoj mankas spicajxo, BV ne kvereli kontraù mi, helpu min antaù ol chi oldulo rezignos eldoni la bultenon.